

ESPERANTO TRIUMFANTA



ELDONANTOJ:

D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W.M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norta, Barcelona.
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro,
Kaunas (Kovno).

Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ADMINISTREJO:

Köln-Horrem, Reinland,
Germanio.
Poŝteka konto Köln 70865,
por Teo Jung, Köln-Horrem.

Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por respondo aŭ respondo aldonu resp-kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ

ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.

Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrejo por oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.

5 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 560 hung. kronoj, 1800 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 15. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 25.50 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2.50 mk.).

JARABONO:

Aperas semajne.

ANONCOJ

kostas po cm² (kvadracentimetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCETOJ kostas po 2 foja enprezo kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/12 jar-abono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/6 jarabono); 1 foja enprezo kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, flandiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazontaĵoj (ĉekfestsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 75 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 12. Marto 1922.

Lasta Alvoko.

Kiu ankoraŭ ne faris sian devon por Genève, faru ĝin tuj!

Nur kvin semajnoj disigas nin ankoraŭ de la tempo, kiam okazos en Genève la konferenco pri la enkonduko de Esperanto en lernejoj. Kvankam ni ne iluziu pri tio, ke la konferenco eble jam rezultigos la baldaŭan enkondukon de Esperanto en la lernejoj de la tuta mondo, tamen ni devas konscii, ke ĝi estas tre grava etapo sur la vojo al tiu ĉi celo, kaj tial ĉiu Esperantisto devas fari sian devon. La eksterordinaran gravecon de la konferenco ankaŭ plene ekkonis la naciaj asocioj kaj diversaj regionaj federacioj.

La Brita Esp. Asocio estas reprezentata de s-o Cox, instruanta Esperanton al knaboj; f-ino L. E. Duncan, instruanta Esperanton ĉe Manchester-a Universitato; s-ino Gillet, Banbury; f-ino Jane Baird, Edinburgh, instruistino, gvidinta la kursojn por infanoj en „Esperanto Monthly“ kaj „British Esperantisti“; s-o George Probert, instruisto en Bedworih; s-o W. M. Page, Edinburgh, vicprezidanto de BEA; s-o John Merchant, Sheffield, vicprezidanto de BEA.

Krom tio jenaj britaj federacioj sendos siajn delegitojn.

Skota Federacio: s-o D. J. Young, M. A., Cowderbeath, lernejestro instruanta Esperanton en oficialaj vesperkursoj; f-ino Watson, Coatbridge, instruanta Esperanton al knaboj en taglernejo.

Jorkŝira Federacio: f-ino C. M. E. Morton, Huddersfield, instruanta Esperanton en popola lernejo al 10-jaraj knabetoj. F-ino Morton paroladis pri tiu eksperimento ĉe la konferenco de Edukaj Asocioj en Londona Universitato la 5. jan. 1922.

La tempo urĝas! Ne restu indiferenta! Kiu ankoraŭ ne faris sian devon, faru ĝin tuj!

Maŝa.

Originala rakonto el ukraina vivo.

Maŝa kuŝis malsana.

Ŝi jam ne memoris, kiom da tempo ŝi estas tiel senforta, senmova. Ofte ŝajnas al ŝi, ke ŝi nur hieraŭ kuris kun aliaj infanoj en la najbara korto, kie la alta densa herbo ondiĝas pro la blovo de la printempa venteto, kie bonodoras flavaj aromaj kamomiloj; ke ŝi nur hieraŭ — aŭtunvespere — promenis kun sia patrino en la stepo, kaj la subiranta suno lumigas la malproksimajn kurganojn, kvazaŭ estingiĝante sur ili.

Aliafoje ŝajnis al ŝi, ke jam de longa tempo falas el la ĉielo neĝeroj, kaj la fenestrovetro estas tute pentrita je fantaziaj floroj, branĉetoj, bestetoj glaciaj. Tra tiuj ĉi frostornamaj vidigaĵoj piedoj de la preterpasantoj. Ĉar Maŝa loĝas en subterejo. El la fenestro vidigaĵo la ŝuoj — jen elegantaj neĝbotetoj de la sinjorino el la unua etaĝo, — jen botetoj de la preterpasantaj laboristoj, jen gamaŝetoj de la knabino kun pupeto.

Multaj aliaj ŝuoj, ŝuetoj, botoj kaj botetoj preterpasas la fenestrojn de la subterejo maldoma, senluma; unuj rapide, gaje, aliaj lace, lamelante.

Maŝa kun sia patrino vivas jam de tri jaroj en tiu urbo, kien ili estis venintaj el Nordrusio. Ili estis tie fute solaj, sen parencoj. La patrino de Maŝa laborakiras la vivrimedojn per kudrado: ŝi estas ĉiam sidanta ĉe la fenestro, kurbigante super la tolaĵo. Ofte ŝi forturnas siajn lacajn okulojn de la kudraĵo por rigardi sian filinon. Tiam, en korveo, ŝi faras krucoŝignojn, pugnobatas sian bruston kaj plende ekploros. — Ho, ve, kial do ŝi havas tian mizeroplanan vivon? Sinjoro Dio, estas severa via puno! Ŝia sola goĵo —

ununura filino, — malsana, ŝi mem tute soleca... Neniu, kiu zorgas pri ili, neniu, kiu diras karesan vorton.

Maŝa arde deziras havi ankaŭ sian paĉjon, kiel aliaj infanoj; sed la patrino, je ŝia demando, kie estas patro, respondas per ŝia ĉama esprimo de korsufero, ŝi faras krucoŝignon, pugnofrapas sian bruston.

Maŝa memore sin vidas kiel grandikan knabon, kiam ili estis venintaj ĉi tiun urbon serĉante bonŝancon. Nun ŝi, ĉekkvartara, ligiĝis al la lito kaj pro malorto kaj febro estas kuŝanta ĉiam.

Antaŭ la fenestro vidigaĵo neĝmonteto, el sub kiu vespere enrigardas iaforte en la subterejon la subiranta suno. La suno ne ŝatas viziti mal-lumajn, ŝimmalsekajn subterejojn. Ĝi preferas pli altajn etaĝojn, en kiuj jam de la mateno ĝiaj radioj respuguliĝas en kristalaj florvazoj, rebriplas sur la molaj, belaj tapiŝoj, lumigas kontentajn, feliĉajn vizagaĵojn.

Post la sunsubiro la senkompata febro komencas turmenti la malfeliĉan knabon; ĝi skuas ŝin jen per varmejo, jen per frostotremo.

Laŭ la konsilo de la najbaro oni skribis sur la enirpordon: „Maŝa ne estas hejme.“ Tion oni faris por trompi la febron, kiu, legonte la vortojn, foriros.²⁾

Sed, ĉu la febro ne sciis legi, kiel multaj en la malgranda ukraina urbeto, aŭ ĉu ĝi malfidis trompemajn homajn vortojn, — la teda malsano aperadis ĉiuvespere. Ne povis forpeli ĝin kuraĉaj herboj aŭ sorĉparoloj, kiujn murmuris apud Maŝa helpemaj najbarinoj.

²⁾ Laŭ la popola kredo tia surskribo sur la pordo forpelas la febron. „Febro“ ĉe tiuj malkleraj homoj estas nomata ĉiu malsano.

Internacia Teknika Asocio (ITA).

Por komenci praktike apliki Esperanton, mi proponas al ĉiuj teknikistoj, kiuj konas aŭ konos Esperanton, fondi kernon de ITA, kiu por siaj rilatoj uzos ekskluzive Esperanton; ĝi ne nomos sin Esperantista, sed tute simple Internacia Teknika Asocio.

Ni komence uzas por niaj proponoj ktp. kiel nian organon ET, kiu ĉiumonate donos al ni iom da loko; ni vidos poste, kiel agi, laŭ la fortoj, kiujn ni povos kolekti. Mi funkcios provizore kiel sekretario, sed mi respondos per la ĉifita gazeto al ĉiuj demandoj kaj proponoj, resumante ideojn kaj argumentojn, kiujn oni proponos. Ni povos ankaŭ publikigi mallongajn artikolojn teknikajn pri diversaj temoj, komencante teknikan rubrikon en ET, kiu povos interesi ĉiujn legantojn.

Dum printempo de la jaro 1923 ni povos kunveni en Torino, pri diskutante temojn el la plej diversaj branĉoj de la tekniko. Mi raportos pri „elektraj fornegoj por la ŝtal-fabrikado“. Ni vizitos kelkajn gravajn fabrikejojn de la ĉirkaŭaĵo, kaj teknikaj asocioj italaj de la urbo amike nin akceptos kaj helpos, dum la lokaj Esperantistoj helpos al ni en la lingva afero. Sufiĉas, ke ni estu 15—20 personoj el 10 diversaj nacioj, por ke nia unua kunveno fariĝu interesplena kaj atentinda por la lokaj aŭtoritatoj kaj teknikistaj kolegoj; espereble, ĉar ni havas tempon antaŭ ni por organizi la aferon, ni estos pli multenombraj.

Ni do komencu labori! Inĝenieroj, kemiistoj ktp., kiuj lernis Esperanton, sendu per simpla karto al mi siajn nomon, profesion, adreson, okupon ktp., kaj mi publikigos ilin en ET por konigi la unuajn kun la aliaj. Poste ni instigos kolegojn,

Ĉiufoje Maŝa ekdormas malfrue, post kutima vespera preĝado de panjo. Antaŭ sanktfiguroj³⁾ lumigitaj de la brilo de diverskoloraj olelampetoj, genufleksas la patrino, plorante, pugnobatante sian bruston. Ŝi plendas pri sia malfeliĉo, mizero, soleco, elpetas pardonon pro siaj pekoj.⁴⁾ Diverskoloraj radioj rebriplas sur la milda vizaĝo de la Dipatrino, kiu kompateme malsuprenrigardas al la malsanca virino. Tremanta lumo de bluj, flavaj, ruĝaj radioj tuŝetas la severajn, malhelajn trajtojn de Sankta Nikolo, Dia Favorato, protektanto de l' mizeruloj, senhejmuloj, forlasitaj, forgesitaj de Dio kaj homoj. La patrino ploras, falas teren antaŭ la sanktuloj.


Konsolu, konsolu, ĉastega Virgulino, el via senpeka, altaĝa restojo sendu pardonon, estu kompatema je la suferanta homaro...

Kiam eksilentas la vespera preĝado de la patrino, Maŝa ofte maltrankviliga en sia febra dormado. Siajn orelojn atingas la muziko, la piedpadoj el supre... Tie dancas gajaj, feliĉaj gejunuloj. Zorgoj ne turmentas ilin en vastaj, luksaj ĉambroj, feliĉe kaj gaje ili travivas sian kontentan ekzistadon...

Kiam Maŝa ankoraŭ estis bonsana, ŝi ŝatis la balojn supre; ŝi rigardis la alvenantajn al la festeno ŝuetojn, — kiaj ŝuetoj, ho Dio! — rozkoloraj, blankaj, helbluaj. Eĉ argentaj kaj oraj ne mankis. Ĝis malfrua nokto haltadis tiam kontraŭ la fenestro de la subterejo la kaleŝoj. Veturigistoj, preskaŭ senvivaj pro frosto, atendis siajn amuzigantajn gesinjorojn. Sed nun la muziko jam ne kaŭzitis plezuron al Maŝa, kaj ŝuetoj jam ne interesis ŝin...

³⁾ Sanktaj bildoj — ikonoj — sin trovas kutime en la dekstra orienta angulo de la ĉambro. Ĉe pifaj homoj antaŭ la ikonoj ĉiam lumas olelampetoj aŭ vaskandeloj.

⁴⁾ La rusa popolo aljuĝas siajn suferojn al sia pekada kaj preĝante elpetas pardonon.



Popoltpipoj el la lando de nia Dekkvara. — Finna familio antaŭ sia ligna domo.

kiuj ankoraŭ ne lernis Esperanton, aliĝi al nia Asocio, lerni Esperanton kaj aboni ET.

Se ni kolektos monon kaj trovos sekretarion, kiu povos sin okupi pri tiaj aferoj, ni vidos, ĉu estos eble eldoni propran gazeton aŭ tute simple dum unua tempo formi memstaran sektion de Internacia Scienca Asocio uzante parton de ties revuo.

Alproksimiĝis la printempo, la frua ukraina printempo, kiam la varmeta stepo venteto ankoraŭ ne forpelis la griziĝintan molaĉan neĝon. Nur la sunradioj fariĝis pli helaj, enrigardante en la ĉambreton de la malsana knabinejo.

En siaj revoj Maŝa jam vidis, ke ŝi promenas kun panjo en la stepo, laŭlonge de izolata arbareto. La patrino kviete kuŝas en mola fresherbeo; Maŝa gaje kuras, kaj la varma venteto kvazaŭ petole ŝin persekutas. El la arbareto aŭdiĝas la melankolia voĉo de kukolo. Laŭ popoldiro ĝi priploras siajn idojn, kiujn ĝi neniam vidis; kaj Maŝa, kiel ĉiuj infanoj, kantas: „Jen la kukolo krias, sur la verdbranĉa saliko... Ĝi sopiras, malfeliĉa, je siaj perditaj infanoj.“ Kaj la birdo respondas per plenda pepado.

Sed subite el la arbaro aperas granda, griza lupo, — kaj ŝi vekiga.

Je la alproksimiĝo de la printempo Maŝa fariĝis pli malforta, pli dormema.

Tiun ĉi nokton la febro ŝin skuas terure. Ŝajnis al ŝi, ke grandega neĝamaso kuŝas sur ŝia brusto, premas ĝin. Poste ŝi songas, ke ŝi staras ĉe la granda forno, la eliranta varmego sufokas ŝin, ŝi ne povas spiri. Ĉie estas disjetitaj belaj, multkoloraj floroj, ŝi deŝiras ilin kaj plektas mirindan florkronon. Kaj kiajn ŝuetojn ŝi havas! graciajn, etajn, pli belajn, ol la dancŝuetoj de ia riĉa sinjorino. La patrino estas gaja, ili loĝas en vastaj belegaj ĉambroj kun ruĝvelura meblaro. Ekvenis nova feliĉa tempo. For la mizero! For la malsano! Ho estu benata, Carino Ĉiela⁵⁾, porplendantino de la malfeliĉaj pekuloj antaŭ la Dia tronejo!

⁵⁾ Dipatrino, Ĉastega Virgulino, Carino Ĉiela — tio estas nomoj de la Madono en Ruslando.

¹⁾ antikvaj slavaj tomboj.

Ni studos iom post iom pri la statuto, kiu devos esti plej simpla, kaj pri aliaj aferoj rilatantaj la progreson de nia ideo.

Do mi atendas la unuajn aliĝojn, kiujn mi petas sendi al mia privata adreso (Torino 5, Ital., Via Verzuolo 48).

D-ro Alfredo Stromboli,
elektro-metalurgiisto.

II-a Komunikado de TEKA.

Inter la membroj de lasta Esp. Kongreso en Praha ĉeestis 36 kuracistoj el 10 diversaj nacioj. Ili decidis restarigi nian TEKA (Tutmondan Esp. Kuracistan Asocio). La nomoj de novaj honoraj membroj kaj de la estraro por 1922 iam estas montritaj en la „I-a Komunikado“ (vidu ET n-o 70).

Vi estas certe, kara kunfrato kaj samideano, tute konscia pri la neceso de rilatoj inter la tutmondaj kuracistoj kaj pri la graveco de Esperanto, por ke tiuj rilatoj estu eblaj. Donu al ni vian aliĝon! Ni tre bezonas kunigi ĉiujn bonvolantajn. Venu al ni!

Anoj de TEKA! Vi estos samtempe anoj de la Int. Sciencita Asocio kaj vi trovos en „Esperanto Triumfonta“ regulajn komunikojn de TEKA. Post ia tempo ni esperas havi specialan ĵurnalon.

La minimuma kotizaĵo estas provizore 5 francaj frankoj aŭ egala valoro, sed ni estas tre dankemaj por plua mono; tio permesos al ni plivastigi nian agadon.

Apotekistoj estas kore akceptataj en la TEKA. Ankaŭ membroj-approvaloj, t. e. neesperantistoj, kiuj aprobas nian agadon kaj deziras nin helpi.

Ni speciale turnas nin al ĉiuj konsuloj de TEKA kun la peto, ke ili faru propagadon, varbu kunfratojn, aperigu en medicinaj ĵurnaloj de iliaj landoj alvokojn, same kiel faris la franca konsulo kun tre bona sukceso, ĉar venis 100 demandoj.

Por ĉiuj sciiĝoj turnu vin al d-ro Briquet, Lille (Francujo), 31, rue de la Bassée, aŭ al d-ro Róbin, Varsovio (Polujo), str. Marszałkowska 113.

Kun samideanaj salutoj

Prof. d-ro Vanveris, Lille,
prezidanto de TEKA.

Konsuloj de TEKA:

- Por Anglujo: D-ro B. Primmer, Struan Bank, Cowdenbeath, Skotlando.
„Aŭstrujo: D-ro E. Sós, Wien I, Tuchlauben 18.
„Bohemujo: D-ro Bischtitzky, Praha V, str. Mikulašska 12.
„Francujo: D-ro Briquet, Lille, 31, rue de la Bassée.
„Germanujo: D-ro Kleider, Nürnberg, Kaiserstr. 7.
„Hispanujo: D-ro Roberto Marany, Huesca.
„Holandujo: D-ro Mees, Hago.
„Hungarujo: D-ro Lórand, Budapest VII, Damjansch u. 56.
„Koreo kaj Japanujo: D-ro Munhyong Ko Hosanmen, Zyunsenkun Heianando (Korea).
„Polujo: D-ro Helman, Lodz, str. Piotrkowska 86.
„Usono: D-ro Van Becelaere, 590 Olive str., El Centro-Kalifornio.

(Daŭrigo sekvas.)

Nia movado en Pollando.

El Pollando ni ricevis samtempe kvar diversajn raportojn. El tio ni konkludas, ke la movado tie pli kaj pli vigliĝas. Unue ni publikigos la raporton de Pola Esp. Servo kaj el la ceteraj raportoj ni mallonge resumos tion, kio ankoraŭ ne estas enhavata de la raporto de P.E.S.

Maŝa ne plu volas vekigi. Ŝi eniĝas en profundan, kvietan dormon, pli dolĉan, pli helbrilan, ol la surtera dormado.

Akceptu, Disinjoro, la animon de la ekdorminta sklavo via, Maria, en vian sanktan restjeon. Pardonu al ŝi ŝiajn pekajn, memvolajn kaj nevolajn. Kaj ripozigu ŝin inter viaj sanktuloj.— Amen!

Kiam tiun ĉi vesperon la febro venis en la subterejon, ĝi fine kredis, ke „Maŝa ne estas hejme“.

Aleksandra Mexin, Montreux.

„Gulliver“ pri la Lingvo Internacia.


(Traduko.)

... Nun sekvis lernejo de lingvistoj. En ĉambro tri profesoroj estis diskutantaj pri tio, kiamaniere oni povus plibonigi la lingvon de la lando. Laŭ unu plano oni devus mallongigi la parolon tiel, ke vortoj multsilabaj fariĝus unusilabaj, oni devus ellasi verbojn kaj konjunkciojn, ĉar fine ĉiu vorto imagebla efektive estas substantivo.

Alia scienculo opiniis, ke ĝenerale oni devus forigi la vortojn: ĉi tiel multon gajnus la lingvo rilate mallongon, kaj ĉi tiu metodo ankaŭ bone influus la sanon. Li pensas, ke per ĉiu eldirita vorto pro frotiĝo la pulmo plimalgrandiĝas iom post iom, tiel ke ĝi mallongigas nian vivon. Kion do fari? Jen kion: ĉar vortoj signas nur ideojn, oni portu ĉe si tiajn objektojn, kiuj signas certajn, en la konversacio troviĝantajn ideojn. Ĉi tiu eltrovo certe estus disvastiginta, se la popolamaso, la virinoj, kaj la malsciencaj homoj, ne estus minacintaj per ribelo, vidante en danĝero la liberan uzadon de sia lingvo. Sed ni ja scias,

Raporto de Pola Esp. Servo.

BYDGOSZCZ. Oni kalkulas ĉi tie 21 UEA-anojn — La ĵus kun helpe de s-ano Hinc starigita Esp. biblioteko nombras pli ol 220 librojn. — La 20. febr. komenciĝis elementara germanlingva Esp. kurso kun 10 p. gvidata de s-ano Pregel. — Pola Esp. Servo ĵus dissendis al ĉiuj Esp. societoj kaj UEA-delegitoj kopiojn de „Letero kaj Demandaro“ de Ligo de Nacioj al landaj Esp. societoj. Konsiderinde, ke de la plenkonvinkiga raporto priesperanta, farota de s-o d-ro Nitobé ĉe ĵa Ligo de Nacioj dependas parte la venko



Al la artikolo en n-o 72 „La Trentino“:
Trento. — Fontano de Neptuno.

aŭ malvenko de Esperanto, oni ankoraŭfoje atentigas, ke ĉi tiu ricevinto de la „Demandaro“ estas morale devigata laŭ eblo kaj scio respondi kaj resendi ĝin plej malfrue ĝis 15. marto al Pola Esp. Servo, Bydgoszcz, Kordeckiego 1a.

BIALA PODLASKA. Funkcias unu elem. kurso, gvidata de s-o Urmacher.

JASLO. Okazis parolado de s-ano Grenkamp-Kornfeld pri „Esperanto kaj Ligo de Nacioj“. Por kurso enskribiĝis 30 p.

JAWORZE (Pola Teŝena Silezio). Fervora propagando de s-o Blahten.

KOSCIERZYNA. Tre vigla propagando de s-o Fajtek inter seminarianoj. Oni ekinteresiĝis la seminario-pastron d-ron Heyke, kiu lernas Esperanton.

LODZ. La 25. febr. Esp. maskobalo sub nomo „En la lando de l' Espero“.

LUBLIN. Je fino de januaro okazis propagand-vespero inter laboristoj. Post prelegoj de s-anoj Wisniewski kaj Zawada anonciĝis 40 kurspartoprenantoj. — Pri Esperanto raportas gazeto „Spółdzielca Lubelski“.

LWOW. Esp. grupo restarigita Sekretario: H. Schnitzler, Lwów, ul. Jagiellonska 17.

MIEDZYRZECZ. Fondiĝis Esp. societo „Konkordo“; sekr. s-ano H. rman Brukarz, del. UEA.

MIOSLAW. Esp. grupo „Amika Rondo“ kalkulas jam 40 aktivajn membrojn. S-o poŝtestro Prabucki sukcesis interesiĝi pri Esperanto la poŝto-direkcion.

ke la amaso estis ĉiam malamiko de la scienco. Spite tion multaj scienculoj jam nun uzas ĉi tiun metodon, kaj ili esprimas la dirotajn per objektoj, kio estas maloportuna nur tial, ke homo havanta la taskon diri multon, estas devigata treni tutan sakon sur la dorso, aŭ dungu du fortajn servistojn por tiu ĉi celo.

Foje mi mem rimarkis, ke du scienculoj preskaŭ falis sub la pezo de sia ŝarĝo. Ili iradis sur la strato, kiel ĉe ni la ĉifonkolektistoj; — renkontiĝante ili demetis la pakojn, serĉadis en ĝi, kaj tiamaniere interparolis dum unu horo. Poste ili helpis unu al alia surdorsigi la sakojn kaj daŭrigis la vojon.

Por mallongaj paroloj oni povas porti la parolerolojn en la poŝo; sed hejme oni tute ne estas ĝenata. Ĝuste pro tio en ĉambroj, kie kunvenadas adeptoj de la nova parolmetodo, kuŝas disŝuite diversaj objektoj destinitaj por la scienco de l' arta konversacio.

Alia prefero de ĉi tiu lingvo konsistas en tio, ke anoj de diversaj nacioj povas kompreni unu la alian; ankaŭ por ambasadoroj kaj diplomatoj mi ne povas imagi ion pli taŭgan.

Kapa en P. (Hungarlando).

Antaŭsentinta printempa.

Sur sia vojo la suno proksimiĝas al la ora pordego de la printempaj stelaroj. Jen estas la signalo al revekiĝo de ĉia vivado el profunda sonĝo, — enkonduko al la monda melodio, kiu ĉiujare eksonas denove kun mirinda leĝeco, — rekomenciĝo de la vivoritmo post profunda dormo. Sub degelanta neĝo junaj ĝermostoj frapetas kontraŭ la glacia kovraĵo, por serĉi vojon al la lumo tra malmolaj, kungluigitaj masoj. Sur la arbaraj ŝeloj rampas verdeta brilo. Malrapide, tir-

PODBRODZIE (Meza Litovio). Polaj ĝendarmoj interesiĝas pri Esperanto.

SIEDLCE. D-ro A. Zegota gvidas unu elem. kurson, UEA kalkulas 10 membrojn.

WARSZAWA. La 4. febr. komenciĝis nova kurso ĉe Esp. Societo „Laboro“. Propagandafiŝoj pri kursoj dissenditaj al ĉiuj pli gravaj societoj de Polio. Lastatempe fondiĝis filioj de „Laboro“ en Zelów kaj Zkarzysko. — Ĉe societo „Konkordo“ okazis je fino de januaro sukcesinta kunveno, dum kiu oni aranĝis i. a. „ĵurnalon parolatan“, kun partopreno de s-anoj Belmont, L. Zamenhof, f-ino Markus k. a. — En ĵara kunveno de „Pola Esp. Societo“, okazinta la 13. febr., oni elektis novan estraron konsistantan el: prez. prof. J. Loth, vicprez. prof. Bujwid kaj Jan Kosteki, sekr. Stankiewicz, kas. d-ro Essigman kaj bibliot. f-ino Zietek. — En UEA-kunveno okazinta la 15. febr. oni elektis por Varsovio tri del., nome: s-anojn Oberrotman, Karolczyk kaj Domoslowski, kaj tri vicdel.: Jarecki, Miernicki kaj Hartman. — La „Org. Komitato de la I-a Tutpoluja Esp. Kongreso“ regule kunvenanta efike laboras. La unue por Pasko-festo fiksita kongrestempo estas ŝanĝita kaj definitive la kongreso okazos en la tagoj de 6—8 de majo. IV-a cirkulero pri kongreso kaj aliĝiloj ĵus dissenditaj. — Esp. Oficejo malfermata ĉe strato Marszałkowska 91. — „Pola Esp. Societo“ ricevis loĝejon en urba lernejo. WOLKOWYSK. Vigle propagandas s-ano Minskier.

ZAKOPANE „Gazeta Zakopianska“ ofte aperigas favorajn notojn priesperantajn.

Resumo de la aliaj raportoj.

BIALYSTOK. Baldaŭ aperos „Esperantaj Akordoj“ de M. Kaplan. — Fervore propagandas s-ano J. Szapiro, del. UEA.

KALISZ. Del. de UEA estas s-ano Stan. Przybylski. Fervora propagando de J. Lustig.

LODZ. La 17. jan. okazis malfermo de unua kurso por laboristoj kaj laboranta inteligentularo. Paroladis s-oj Rapalski, Berman kaj Zys, gvidanto de l' kurso. Pro granda nombro de kursanoj oni dividis la kurson je kvar grupoj.

PABJANICE (fabrikurbo apud Lodz). Propagandas s-anoj Swiderski kaj Dolka. Laŭ iniciato de s-o J. Konderak kaj f-ino Jadwiga Godlewska okazis la 22. jan. kunveno de lokaj Esperantistoj, dum kiu oni decidis malfermi filion de Pola Esp. Societo. Ĉeestis s-o Wl. Pfeiffer, komitatano de P. E. Societo el Lodz.

TUREK. Dank' al klopodoj de la tiea Pola Esp. Informejo la Esp. movado plivigligas ankaŭ en apudaj urboj. S-ano Henkel propagandas Esperanton inter lokaj gimnazianoj. La 1. febr. s-o Strelczyk komencis kurson, kiun partoprenas interalie policestro s-o Wesolowski kun dekkelkaj policanoj.

ZDUNSKA-WOLA. S-o Kaz. Swiatek, iama Lodzano, klopodas fondi filion de Pola Esp. Societo.

Kongresoj.

Internacia Antaŭkongreso 1922 en Lübeck.

Kiel ni jam sciiĝis, la samideanoj de Lübeck (Germ.) intencas aranĝi antaŭkongreson kaj karavanon de Lübeck al Helsinko kaj reen per speciala vaporsĝipo. La ŝipo estos luata ankaŭ dum la kongreso mem kaj servos tiam kiel hotelo por la partoprenantoj. Laŭ nuntempaj ekonomiaj cirkonstancoj la prezo por la al-kaj reveturo, loĝado sur la ŝipo dum la kongreso kaj manĝaĵoj dum la tuta daŭro de la karavano estas ĉ. 3000 ĝis 4000 gmk. po persono; ĉu ĝi poste fariĝos pli alta aŭ malalta, estas nun ne direbla. Necese estas, ke minimume 300 partoprenantoj estos anoncigitaj, antaŭ ol la ŝipo estos luata.

ate supren de la suno, leviĝas la suko ĝis la branĉaj burĝonejoj ĝin atendantaj. En la arbaroj la mortintaj folioj el la pasinta aŭtuno devigate cedas al la nova vivo. En la kampoj ekĝermas la semajoj. Vermoj kaj aliaj bestetoj, ankoraŭ dormemaj, scivolaj, singarde palpante rampas el siaj vintraj rifuĝejoj. La aero trembriletas blue super la horizonto. Kvankam estas nur marto, en la ĝardenoj ĉiuloke vekigigas Paska antaŭsentinta, antaŭprovo de etaj, malaltaj, koloraj bulbajoj. Eble oni jam distingas la etendiĝon de la branĉetoj en arbustoj. Birdoj saltetas kaj flugas pli rapide. Odoro de tre proksima unua verdo eliĝas el la tero.

Kaj la homo. La suno direktas ankaŭ lin, ekmovas lian vintre malvigligintan vivoritmon, igas rondiri lian sangon pli rapide. La brusto plilargiĝas, la pulmoj spiras pli libere. La spirito heliĝas. Vekiĝas sonanta kuraĝo: „Persistu spite ĉiuj potencoj!“ La vivo disponas pri mirindaj fortoj, el kiuj ĝi povas krei kaj konstrui. Ĝi moviĝas kaj etendiĝas borante pli profunde en la fontojn de l' naturo.

La suno estas super ĉiu vivo kaj malrapide proksimiĝas al la ora pordego de la printempaj stelaroj

Nia feliĉo . . .

- | | |
|---|---|
| Nia feliĉo:
Nokto senstela;
Veturado sen fin'
Sur lago nebula. | Nia feliĉo:
Suno mortanta;
Flaviginta foli',
Aŭtuno ĉiama. |
| Nia feliĉo:
Songo aŭtuna;
Forvelkata floro'
Sub rel' aranea. | Nia feliĉo:
Ho! nur revado;
Papilio-pelad' —
Malgaja muziko. |

Tiberio Morariu, Cluj (Rumanio).

La antaŭkongreso daŭros de lundo, 31. julio ĝis merkredo, 2. aŭg.; la ŝipo forlasos Lübeck'on ĵaŭdon, 5. aŭg., matene.

Kotizo por la antaŭkongreso: Germanujo 30 gmk., Aŭstrujo 100 kr., Belgujo 12 fk., Britujo 6 ŝil., Bulgarujo 42 lev., Ĉeĥosl. 30 kč., Francujo 12 fk., Hispanujo 7 pes., Hungarujo 100 kr., Jugosl. 60 kr., Italujo 17 lir., Nederlando 3 50 hfl., Rumanujo 37 lej., Svisujo 6 fk., Usono 1.50 dol. Eksterlandanoj bonvolu sendi bankbiletojn aŭ ĉekojn en la valuto de sia lando. La adreso por ĉiuj leteroj kaj mono estas: Heinrich Selmer, Falkenwiese 11, Lübeck, (Germ.).

La 6-an komunikon pri la XI-a Germ. Esp. Kongreso en Breslau

ni publikigos en venonta numero, ĉar en la hodiaŭa bedaŭrinde mankis la loko. Hungaraj samideanoj intencas aranĝi karavanon al la germana kongreso en Breslau, ĉar por hungaroj estos malfacile viziti grandnombre la XIV-an en Helsinko, sed ne tro malfacile viziti Breslau-on. La provizora gvidanto estas s-o J. Major, Budapest IX, Remete u. 36-II-4. Kiel ni aŭdis, ankaŭ ĉeĥoslovakaj kaj polaj samideanoj intencas viziti la germanan kongreson, tiel ke ĝi fariĝos parte internacia.

Junularo.

La Demokratia Internacio Gejunulara kaj Esperanto.


La Demokratia Internacio Gejunulara, starigita ĉe Kopenhaga kongreso, en aŭgusto 1921, estas ligo de naciaj federacioj, konsistantaj el diversaj grupoj, kiuj, flankmetante ĉion, kio povus ilin apartigi en aliaj kampoj, volas pozitivie kunlaboradi por interkompreno kaj paco, per ĉiuj projoj.

Ĉe la kaploko de tiu ligo estas ĝenerala sekretario en Kopenhago, kaj kontrolkomisiono. Ĉiu nacia grupo povas libere fari propagadon laŭ la metodo, kiun ĝi opinias plej fruktodona.

La demando pri internacia lingvo estas esportota por la venontaj kongresoj. Bedaŭrinde multegaj aniĝintoj ne parolas Esperanton, kaj, aliflanke, inter ili troviĝas precipe en Skandinavio Idistoj. Pro tio, estas nepre dezirinde, ke la Esperantistaro aktive interesiĝu pri tiu movado, kiu ja tute estas konforma je la interna ideo, ke Esperantistoj aliĝu kaj, tion farinte, neprigu la triumfon de sia lingvo ĉe D. I. G.

Interesiĝantoj sin turnu al s-o Hermod L. Lannung, Vandersgade 29-3, Kopenhago K (Danujo), ĝenerala sekretario de la D. I. G.

Ni ĵus aŭdis pri la franca federacio de D. I. G., ke ĝi aranĝis en Parizo, la 15. febr., kunvenon publikan por diskuti pri la temo: Societo de Nacioj kaj societo de popoloj. Ĉe tiu okazo s-o Archdeacon parolis pri Esperanto, kun sia kutima fervoro. Poste Idisto kontraŭparolis senefike. Multaj poresperantaj propagandiloj estis disdonataj kaj vekis videblan intereson. — Lob.



Al la artikolo en n-o 72 „La Trentino“:
Trento. — La kastelo.

Diversaĵoj.

Sensacia eltrovo.

Laŭ „Dziennik Narodowy“ el Piotrków „Pollando) al s-o Mieczysław Sznajder, teknikisto en fabrikejo „Wojciechow“ en Kaminsk apud Piotrków, sukcesis eltrovo tre grava ĉe la produktado de mebloj, same kutimaj kiel fleksataj, de domaj konstruopartoj, de skulptaĵoj, figuroj, ĉerkoj, luksaj objektoj kaj multaj aliaj.

La dirita eltrovo ebligas fabrikadi tiujn ĉi objektojn helpe de fandformoj.

Sur kio bazas la eltrovo? Sub alta temperaturo de fluidaĵo la ligno transiras post kelka tempo en staton de kazeo, ne perdante tamen la ĉefajn fibrojn kaj lignon, t. e. sian kluajn. Tiu ĉi pasto eniĝita en ĝustajn formojn kaj varmegajn presilojn donas post kelkaj horoj pretan fanditajn ne diferencantajn per io ajn de produktaĵoj mekanikaj aŭ manmaŝinaj.

La objektoj fabrikataj laŭ tiu metodo havas ankoraŭ la plian valoron, ke ili ne estas brulemaj, kaj ke dum sia densfluida stato ili estas kolorigebaj per kolorigaj fluidaĵoj, per kiuj ili povas ricevi belegajn profundajn tonojn kaj marmoraspektajn desegnojn.

La disvolviĝo de la eltrovo povos eventuale bankrotigi la ĝisnunan lignometion kaj kaŭzi kompreneblan konkuradon sur la mondfoiro.

(El pola gazeto „Dziennik Kujawski“ tradukis Józef Orzech.)

Ne restu indiferenta! Faru vian [devon] por Genève!

Fervojo.

Fervojistoj ĉiulandaj!

La estraro de la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (I. A. E. F.) intencas aranĝi fakan kunvenon dum la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko. La tagordo estos tre grava. Ni nur citas: voĉdonado pri la regularo; elekto de la estraro, ĉar la ĝisnuna estraro akceptis siajn oficojn dum la XIII-a nur provizore por unu jaro; fervojo terminaro ktp. Sed la intenco restos nur intenco, se la kolegoj, precipe en la altvalutaj landoj, ne helpas. La vojaĝkostoj al kaj la restado en Helsinko estas multekostaj, precipe por ni estraranoj loĝantaj en la malbonvalutaj landoj Ĉeĥoslovakujo kaj Germanujo. Nia asocia kaso, ĉar ankoraŭ juna, ne estas tiel riĉa por doni subvenciojn eĉ nur al unu estrarano. Do kolegoj, se vi deziras, ke ni aranĝu fakan kunvenon, helpu al ni per mondonacoj. Ĉiu eĉ malgranda sumo estas danke akceptata. Bonvolu sendi la monon lere al nia kasiso, fervoja revizoro Emanuel Kubasek, Plzen, Lo-bezka ul. Prov. domy Skup. B-1-68, Ĉeĥoslovakujo. La finnaj kolegoj kore estas petataj, havigi al ni senpagan loĝejon en Helsinko. Sciigojn pri tio bonvolu sendi al la subskribita prezidanto. Proponoj por la tagordo akceptas la sekretario.

Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj.

Georg Habelok, f. insp. — prezidanto
Breslau 10, Schleiermacher-straŝe 19, Germanujo

Josef Blazek, f. insp. — sekretario
Olomouc, Müllerova 266, Ĉeĥoslovakujo.

Atentigo


Ofte la redakcio de ET ricevas hektografiitajn manuskriptojn kun peto pri enpresado: raportoj, sciigoj pri kongresoj aŭ kunvenoj, petoj, alvokoj, ktp. Sed plejparte tiuj hektografiitaj estas tute ne aŭ nur parte legeblaj. Ĉu ne estas eble, ke al la redakcio de la du internaciaj Esp. gazetoj (ET kaj „Esperanto“) oni sendu ĉiam la unuajn, nepre bone legeblajn kopiojn? Alie ni ne povas garantii seneraran represon aŭ devas tute rifuzi la publikigon.

Laboristaro.

Kongreso de SAT.

Oni petas nin komuniki, ke la adreso de la kasiso estas: Rudolf Meyer, Frankfurt a. M.-West, Rödelheimer Landstrasse 24. Negermanoĵ bonvolu pagi sian kongresokostojn nur per rekomendita letero en naciaj monbiletoj (aŭ ĉekoj por la „Frankfurter Sparkasse, Giro-Abt.“): germanoĵ uzu la poŝtĉekon konton n-o 50280, Frankfurt.

Al la kongreso de SAT aliĝis ĝis 25. febr. 8 germanoj, 5 francoj kaj 1 italo.



Al la artikolo en n-o 72 „La Trentino“: Trento. — Monumento de Dante.

Internacia junula tago en Belgolando.

En la gazeto „Die Arbeiter-Jugend-Internationale“ (Berlin SW 68, Lindenstr. 3) ni legas, ke en 1922 okazos internacia junula tago aŭ en Antwerpen aŭ en La Louvière. La belgaj samideanoj ne preterlasu ĉi tiun okazon, varbi inter junuloj el ĉiuj landoj; sed ankaŭ la samideanoj el aliaj landoj zorgu pri tio, ke la partoprenontoj de la tago, kiuj jam estas Esperantistoj, helpu la propagandon.

Germanlando.

„Der Arbeiter-Esperantist“ (La Laborista Esperantisto) de 1. marto raportas pri vigla agado de la lab. grupoj en la jaro 1921. La nunjara kongreso de Germ. Lab. Esp. Asoc. (Glea) okazos dum Pasko en Düsseldorf. — Novaj grupoj en Rotthausen apud Essen kaj en Zuffenhausen (Württemberg).

En Kristiania (Norv.)

s-o A. Selher faris la 4. febr. paroladon en „Arbeidersamfundet“ (societo de la laboristoj) pri la Esp. movado. La multnombra ĉeestantaro forte aplaudis lin. Por nova kurso anoncis sin 18 personoj, inter ili konataj gvidantoj de la norvega laboristaro.

Ĉu via grupo jam

aranĝis la poekzempleran vendadon de ET? Postulu tuj niajn kondiĉojn! La grupo havas materialan gajnon de 25-35 % kaj ne takseblan moralan gajnon, ĉar la ĉiusemajna ĵurnalo per la aktualo de sia enhavo ĉiam denove vigligas kaj ĉiam pli intensigas la intereson por Esperanto.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Balkana Kroniko.

Neniam la Esp. movado estis tiom vigla en balkanaj landoj, kiom ĝi estis dum la pasinta jaro 1921.

Tri centroj komencis sian aktivan agadon: kroatoj en Zagreb, bulgaroj en la tuta lando, kaj grekoj en Konstantinopolo. Oni verkas kaj presigas lernolibrojn, eldonas lokajn foliojn, fondas societojn, malfermas kursojn.

Inter la dekmiloj da rusaj rifuĝintoj, kiuj venis Balkanon en la jaroj 1920 kaj 1921, estis multaj Esperantistoj, kiuj alportis kun si entuziasman fajron, kaj tiu fajro estis kvazaŭ eĉo de l' iama Esperantista vivo de Moskvo, Petrogrado kaj aliaj urboj.

Fervoraj izoluloj en Mostar, Subotica, Skoplie, Sarajevo nevideble laboras kaj preparas pli feliĉajn tagojn. En Belgrad kaj Split organizigas societojn. Revekigas malnovaj Esperantistoj.

Malmola estas la grundo balkana, kvankam dum jarcentoj surverŝita de sango homa; malfacila estas idea laboro inter malkulturaj montoj, sed en paciĝaj valoj jam ekgermis semoj delonge jetitaj, kaj nun kreskas nia movado, post preskaŭ dekjaraj paŭzoj.

P. E. S-n.

Estonio.

La Zamenhof-vesperon en Tallinn (Reval), la 15. dec., partoprenis 40 anoj de „Espero“. Okazis paroladoj, deklamoj, kantoj ktp. — La 15. jan. prof. Väisälä paroladis pri Esp. antaŭ 400 personoj. La gazetoj favore raportis. — En januaro komenciĝis kvar kursoj kun ĉ. 100 partoprenantoj. — La Urba Legejo aĉetis Esp. librojn por la biblioteko je valoro de 10000 est. mk. Por 1922 ĝi abonis por la legantaro „Esperanto“ de UEA, ET kaj „Esp. Finn.“. — Preskaŭ ĉiutage aperas sciigoj pri la Esp. movado en la lokaj gazetoj.

En Tartu laŭ propono de prof. Väisälä la Universitato decidis komenci Esp. lekciojn ĉe la filozofia fakultato en la Universitato. Partoprenas 100 personoj.

Latvio.

En Jelgava (Mitava) fondiĝis en decembro 1921 Esp. sekcio ĉe la Kulturakcela Societo de Zemgalio, la plej grava kultursocieto de Jelgava kaj ĉirkaŭaĵoj. La iniciatintoj estas s-oj V. Bor-manis, K. Strazde kaj E. Lejenieks. La sekretario de la sekcio K. Strazde gvidas du grupojn da gelnarantoj de Esperanto; entute lernas en Jelgava ĉ. 35 personoj. La sekcio aranĝis ankaŭ perpoŝtan instruadon. Dank' al tiu ĉi maniero de instruado jam fondiĝis grupo en urbeto Priekule (ĉe Liepaja) kaj en aliaj lokoj ankaŭ ekfondiĝas. — Ĝis nun mankis lernolibro kaj vortaro por latvoj. Sed en la fino de januaro aperis tute neatendite lernolibro kun Esp.-latva vortaro kaj forigis tiun mankon. Kredeble la nova libro akcelos nian aferon en Latvio.

Esp. kurso en Rabaŭl.

En Rabaŭl, urbo sur iam germana insulo Neupommern apud Nov-Gineo (Aŭstralio) komenciĝis malgranda kurso por ĥinoj, kiuj lernas Esperanton per germana lingvo, kun aprobo de la estro de unu ĥina lernejo. Unu lernanto estas miksrasa, ĥino-melaneziano. Ankaŭ kelkaj eŭropanoj ekstudis Esperanton, kaj espereble oni povos baldaŭ starigi eŭropanan Esp. grupon.

Ruslando.

Sano A. A. Saharov en Moskvo tradukis rusen la Esp.-francan parton de l' vortaro de Boirac. La tradukon partoprenis profesoroj de la Moskva Universitato M. Polenkin (botaniko), P. Kojevnikov (zoologio), A. Uspenskiĵ (kemio), P. Karuzin (anatomio), S. Obruĉev (geologio kaj mineralogio). La vortaro estas baldaŭ presota.

En Orel funkcias kvar Esp. kursoj kun 40 p. La societo vige eklaboris. Estas organizata serio da diverstemaj sciencaj lekcioj en Esp. de lokaj superlernejoj profesoroj.

Kristiania (Norvega lando).

La 10. febr. s-o R. Bugge Paulsen faris paroladon pri la nuna stato de la Esp. movado, en la festhalo de l' Universitato, antaŭ multnombra eminenta ĉeestantaro. Dekkabineta ĥoro kantis kaj deklamis en Esperanto. Ekspozicio de Esp. gazetoj kaj libroj vekis grandan intereson. Rezolucio direktota al la registaroj pri subvencio al la Esp. movado en Norvega lando estis unuanime akceptata. La tagaj ĉefgazetoj lastatempe aperigis artikolojn favorajn al Esperanto. Vidu ankaŭ sub „Laboristaro“. (M. M.)

Nederlando.

En la jarkunveno de akcilioj de la Societo Anonima „Centra Esperanto Librejo“ en Hago, okazinta la 25. febr. sub prezidanteco de s-o d-ro H. C. Mees, la bilanco kaj la profita kaj malprofita konto pri 1921 estis aprobataj. La dividendo estis fiksa je 6%. Anstataŭ s-o P. J. Vermaas el Rotterdam, la ĉeestintoj elektis s-on J. Ravestein jr. el Hago kiel komisarion.

Hungarlando.

La 3. febr. estis la nova fondiĝkunveno de la unua budapeŝta grupo en la Socia Muzeo. La grupo apartenas al la Landa Societo kaj devas gvidi la budapeŝtan movadon, dum la estraro de la Landa Societo organizas la tutlandan movadon. La „kamerkunsidoj“ de la grupo estas nun ĉiuvendre en la Socia Muzeo; ĉiu Esperantisto povas partopreni en la diskutado. — La grupeto ERA aranĝis kabaredo-vesperon la 26. febr. (Vidu specialan raporton!) — La grupo en la Kelenföldä Kazino regule kunvenas.

En Salzburg (Aŭstrio)

oni fervore preparas la Sudgermanan Kongreson. Kursoj komenciĝis kun 91 partoprenantoj, el kiuj la duono estas fervojistoj aŭ seruristoj de la fervojo. Samtempe sin anoncis aro da kelneroĵ por speciala kurso kaj ĉ. 80 personoj por laborista kurso. Ankaŭ en la liceo komencis kurso, gvidata de prof. Christianell, kaj alia en „Kapellhaus“, gvidata de s-o Huber. Mankas sufiĉe da instruantoj. Ankaŭ en la provinco vigligas la intereso por Esperanto.



Al la artikolo en n-o 72 „La Trentino“: Rovereto. — Monumento de Rosmini.

Subvencio de 1000 liroj

decidis la urbestro de Milano al Itali Esp. Federacio. La urbestro de Milano, d-ro Filippetti, prezidanto de la Esperanta Domo, paroladis la 26. febr. pri Esperanto ĉe la Popola Universitato de Legnano; unuagradan kurson gvidas f-ino Pomarici.

Siberia Lulkanto.

(Muzikigita de Jozefo Ammer.)

Hirte flirtas kun la haroj
Ludas vintra vent' —
Morde torde ŝiras koron
Larmoj kaj la sent' —
Plor' patrino kante sonas,
Dormas filo en lulil';
Noktripozon por li donas
Song' infana en trankvil':
Baju baju bajuŝki . . . *)
Dormu kara, dormu vi!
Ĝemo, ploro kaj dolor'
Flugu for de via kor'!
Baju baju bajuŝki . . .
Dormu kara, dormu vi!

Brue skue blekas vento,
Knaras ligna dom' —
Ĝeme treme sin forkaŝis
Besto kaj la hom' —
Veni' alportas sangan krimon
Tra l' glacia neĝa val';
Lastaspire petas Dion
Preĝ' de l' patro en batal'. —
Baju baju bajuŝki . . .
Ho, flegto dormu vi!
Kri' de l' morto, son' de l' plor'
Flugu for de via kor'!
Baju baju bajuŝki . . .
Dormu, kara filo, vi!

Prude krude fremdaj homoj
Venas el insid' —
Trompe rompe sangriumpf
Venkas la perfid' —
Plor' patrino kante sonas,
Dormas filo en lulil';
Teran pacon por li donas
Sort' de l' patro en trankvil'.

Baju baju bajuŝki . . .
Kara mia filo vi!
Anĝeleto, pala roz',
Dormu nur en pacripoz'!
Baju . . . baju . . . bajuŝki . . .
Dormu do . . . eterne . . . vi!

En Siberio, sept. 1920. *Julio Baghy.*

*) „Baju baju bajuŝki“ estas rusa interjekcio por dormigi infanojn.

Gazetaro.

Jornal Pequeno, Ceara-Fortaleza, Braz., 17. jan. (Artikolo pri Esp. kaj inĝenieroj.)
L' Index des Industries du Cuir, Paris, n-o 2. (Kun informoj pri la Esp. movado.)
La Caravane, Gaillet-sur-Tarn, Franc., jan. (Artikolo en Esp.)
L'Ere Nouvelle, Paris, 16. febr. (Artikoloj pri Kongreso de l'Internacio de Junularo, dum kiu s-o Archdeacon parolis pri Esp.)
Le Syndicaliste des P. T. T., Paris, n-o 95. (Artikolo de S. Frantz pri „La Universala Poŝto-Unio kaj Esp.“)
La Rampe, teatra ĵurnalo, Paris, 11. 2. (Artikolo „Esp. kaj teatro“ de konata verkisto Léon Frapié)
Rinascita, Napoli, Italio, 18. febr. (Traŭduko el ET de „Letero al Pollando“ kaj Esp. leciono.)
Anzeiger des Bezirkes Horgen (Svisl.), 24. 2. (Artikolo „Ligo de Nacioj kaj Mondlingvo“ de Ts R. Studer)

Nieuwe Hengelosche Courant, 22. febr. (Traduko el ET: Vizito ĉe la eltrovinto Schoop.)
Der Bund, Bern, Svisl., 7. febr. (Artikolo pri Svisa Spec. Foiro en Basel kaj Esp.)
Norsk Bokbinder-Tidende, Kristiania, 15. 2. (Art. en Esp.)
Ornsköldsvisks Allehanda, 5. febr. kaj Ornsköldsvisks-Posten, 4. febr., Sved. (P opagandaj artikoloj de C. W. Sjögren.)
Volkszeitung, Bromberg, Pol., 11. kaj 18. febr. (Esp. anguloj.)
Der Internationale Herald (La Internacia Heroldo) Nova monata revuo por la interpaco kaj interkompreno de la popoloj. Eldonas Willi. Hopf Nachf., Melsungen, Germ. Frankfurter Messzeitung, 18. febr.
Volksrecht (kiu urbo?), 15. kaj 18. 2. (Art. de d-ro J. Levy pri Esp.)
Sekvantaĵ ĵurnalojn en Wien (Aŭstrio) enhavis artikolojn pri Esperanto: Arbeiter-Zeitung, 7. 2., Die Rote Fahne, 19. 2., Delnicke Listy, 21. 2., Der Abend, 18. 2., Neue Freie Presse, 20. 2.

Por helpi la samideanojn en Ruslando

ni disponis denove por ili 40 pakajojn po 11 diversaj numeroj de ET. Ĉar ni ne ankaŭ povas pagi la altan sumon por aŭfrankajo, ni donis ilin al la komunista partio en Köln, kiuj sendigos ilin tra la komunista centro en Berlino al Ruslando kun aliaj sendaĵoj el Germanujo. Rusaj samideanoj, kiuj havas intereson, ricevi unu el la pakajoj, turnu sin al la koncerna oficejo en Ruslando, kiu ricevas la sendaĵojn el Germanujo. Ni ĝojus, se ni iam aŭdas pri la ricevo.

Recenzo.

GAZETOJ.

France-Esperanto. Jan. kaj febr.
La nova monata organo de la francaj Esperantistoj, daŭrigo de „Franca Esperantisto“. Redakcio kaj Administracio: 51, rue de Cligny, Paris 9.
Kvankam pli modesta ol „Franca Esperantisto“, ĝi tamen estas leginda ne nur por francaj sed ankaŭ por eksterlandaj samideanoj, al kiuj ĝi alportas interesajn novaĵojn. En ĉiu numero estas artikolo de iu franca eminentulo-amiko de Esperanto, skribita speciale por „F. E.“. La januara n-o enhavas artikolon de s-o Aulard, profesoro de historio en la Pariza Universitato; en la februara n-o troviĝas artikolo de s-ino advokatinio Maria Verone, prezidantino de la Franca Ligo por Virinaj Raitoj, pri Esperanto kaj Feminismo. — Diversaj rubrikaj kaj listo de ĉiuj francaj Esp. grupoj kompletigas la enhavon.
Belga Esperantisto. Jan.-febr.
La Suda Kruco. Jan.
Bulgara Esperantisto. Jan.
La Espero. Febr.
Egipta Esperantisto. Febr.
Bulletin de S. F. P. E. Marto.
L'Espérantiste Révolutionnaire. Jan. Adreso: 23 bis, rue Morère, Paris 14.
La France Postale Espérantiste. Jan. Adreso: M. Michelis du Rienzi, 20 avenue Reille, Paris 14.
Der Arbeiter-Esperantist. Marto.
Holanda Esperantisto. 2. marto.
Ruĝa Esperantisto. Febr.
Interesa estas la prezo de tiu ĉi gazeto, kiu estas kalkulata je 5 kopekoj orvalutaj aŭ 7500 rubloj sovietaj.
Litova Stelo. Jan.
La eldono de nova nacia Esp. organo en lando, kie ĝis nun ne ekzistis propaganda gazeto, ofte estas signo de nova ekfloro de nia movado. Ni esperas tion pri Litovio, unu el la plej junaj sendependaj ŝtatoj, estiĝinta el la mond milito. N-o 1 de „Litova Stelo“ estas 12-paĝa (formato 24 : 32 cm), ilustrita, kun diversspecaj enhavo; sed ni dubas, ĉu niaj litovaj s-anoj povos ĉiutage eldoni samamplakan gazeton. Adreso: J. Mačernis, Kaunas, Ukmerg. pl. 45.
Berliner Esperanto-Mitteilungen, Berlin, kaj Nordaltinger Esperanto-Mitteilungen, Lübeck.
Du novaĵ Esp. „gazetoj“, pliĝuste bultenoj, kiuj jam aperis antaŭ la milito. Ni ne volas diskuti, ĉu estas konsilinde (ĉe la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj kaj altaj preskostoj), ke ĉiu provinca ligo aŭ u-ba societo eldonu sian propran organeton, precipe en Germanlando, kie ekzistas bona „Germ. Esperantist“.
Hungara Esperantisto. Febr.
Kun aldono „Karnavalaj Bombonoj, ĉiujara organo de Saitro“.
L' Esperanto. Jan.
Kun nova modernigita sed preskaŭ nelegebla kovrilo. Interesa diversspeca enhavo, 10 ilustraĵoj. Adreso: A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, Italio.
Skolta Esperantista Ligo. Tria bulteno. Jan. Kun portreto de trupestro Avoto, prez. de la Ligo. Adreso de la ĝen. sek.: Norman Booth, Netherton, Huddersfield, Angl.
The British Esperantist. Febr.
La Progreso. Febr.
Katolika Mondo. N-o 6 (sen dato).
Espero Teozofia. Jan.-febr.
La Provo. Febr.
Marto. Febr.
Sennacieca Revuo. Febr.
Germana Esperantisto. Febr.
Esperanto Praktiko. Febr.
Brazila Esperantisto. Febr.
Kosmogio. Febr.

PROSPEKTOJ, KATALOGOJ ktp.

ESPERANTO-KATALOGO. Febr. 1922. Eldonis Esperanto-Verlag Friedr. Ellersiek, Berlin S. 59, Wissmannstr. 46. Formato 10 1/2 : 16 cm. 52 pĝ.
WIESBADEN. Oni petas nin komuniki, ke la bela prospektujo pri la banurbo Wiesbaden recenzita en ET n-o 71 estas senpage ricevebla laŭ simpla mendo per poŝtkarto de Städtisches Verkehrsamt, Wiesbaden, Germ.

LIBROJ.

UNUJ PAŜOJ. Facila libro por lerneja legado. Kunmetis kaj aranĝis Alexandra Mexin. 145 pĝ. 15 : 25 cm. Eldonis „E. D. I. P.“ Editions internationales populaires, Genève (Suisse), Passage Terraliet, 18. Prezo: ne montrita. Kvazaŭ abelo mielon kolektanta s-ino d-ro Mexin diligente kompilis abundan materialon por ĉi tiu libro. Ĝi estas nek lernolibro nek ekzerco gramatika, ĝi celas nur faciligi al komencintoj la legadon donante legaĵojn t. e. anekdotojn, fabelojn, spritaĵojn, legendojn, sciencajn proverbojn, versaĵojn ktp. el la literaturo diversnacia, krome — por franclingvanoj — multajn ekzemplojn de esperantigitaj galicismoj esperantigitaj de s-ino Mexin. 210 prozaĵoj kaj 15 poeziaĵoj — jen la tuta enhavo. Pro tio, ke multaj helpantoj el ĉiuj landoj kunlaboris, internacieco estas atingita — ne ofte vidita, kvankam la rusa kaj franca lingvoj kvazaŭ ruĝa fadeno sin montras ĉiuloke. La stilo estas laŭdinda kaj ĉiuj frazoj facile kompreneblaj. Kelkaj preseraroj kaj lingvaj strangaĵoj ne estas gravaj. — Ni varme rekomendas la libron al la samideanoj ne nur por perfektigo en nia lingvo, sed ankaŭ por lerni multon el la interesaj sciindaĵoj el vivo kaj mondo, kiujn la libro prezentas. — (G. Ajut.)

LA MALBONAĴ FLANKO DE SPORTO KIEL ANSTATAŬAJO DE FIZIKA LABORO RILATE HIGIENON de D-ro Juhan Vilms. Kun permeso de l' aŭtoro el estona lingvo

tradukis J. Vahtkeri, Tallinn, Estonio. 1922. 24 pĝ. 14 1/2 : 20 1/2 cm. Prezo ne montrita.

Kiel sportulo mi tralegis la libron de l' doktoro el la nordorienta lando de Eŭropo kun granda intereso. Mi ne nur pliivigis miajn sciojn pri sportaj aferoj, sed ankaŭ ĝojis, ke pere de nia lingvo disvastiĝis tia valoro laboro tra la tuta mondo. La esona lingvo ja estas parolata de nur malmulte da homoj rilate al aliaj lingvoj. Ĉiuj kleriguloj ĉerpi perlojn el la artikoloj de D-ro Wunsch (vidu la unuajn numerojn de ET) kaj ili trovas same multon atentindan kaj kontentigan en la broŝuro de faka kuracisto, kies informoj estos utilaj al ĉiuj, kiuj serĉas ripozon kaj ĝuon post laciga mensa laborado en la sporto. — Mi malatenas la lingvan vidpunkton. Sendube la tradukinto kelkfoje pekis lingvarilate kaj uzis strangajn idiomojn (ekzemple „ke“ anstataŭ „por“ k. a.), same mi trovis preserarojn; sed la verko je ne estas beletristika intencante diskonigi ideon kaj ne literaturaĵo. Eble la tradukinto korektigis sian ellaboritaĵon okaze de dua eldono de sperta samideano (mi rekomendas mian amikinon f-inon Helmi Drezen, Tallinn, diplomitino de Esp.). — Amikoj de sporto kaj korpoj ekzercoj trovos en ĉi tiu broŝuro ion jam longtempe serĉatan. (G. Ajul.)

La mond fama slova vilaĝana manlaboro!

Broderojn, jakojn, tablutokojn, puntajn kurtenojn ktp. mi rekomendas je plej favoraj prezoj. Okaze de mendoj oni povas pagi ankaŭ per fremdaj valutoj.

Kun la eksterlando mi korespondas nur en Esperanto aŭ en germana lingvo.

Informojn petu de **D. Rakovszky, Sered, Slovakio**
Zupa Bratislava.

Peto.

La subskribanto, kiu de 11 jaroj malegoiste batalis por nia ideo, estis sen sia kulpo malliberigita dum sep monatoj (ne pro politika afero). Kiam fine elmontriĝis mia senkulpeco, la juĝistaro forpemis min. Liberigite mi ne trovis laboron kaj antaŭvideble ĝis longa tempo ne trovos. Pro tio mi falis kun mia familio en plenan mizeron. Por provizore helpi min, mi uzas tiun ĉi rimedon, la lastan, turnante min al la bonkoreco de la Esperantistoj. Helpe mi! Se estonte mia situacio reboniĝos, mi ĉion repagos. La oferdonacojn bonvolu sendi en rekomendita letero al jam antaŭdankanta Bela Kardos, dentisto, delegito de UEA dum 1921. Adreso: Győr, Hungario, Csatorna u. 3 n.

(S-o Kardos siatempe fondis Esp. grupojn en sep provincaj urboj kaj gvidis sume 42 kursojn.

Abonejoj de ET
en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 54.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Fr. Gaševski, Bul. Marie Luža 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenuau.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkaste 6, Tallinn.
Finna: O. Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Francia: Esp. Centra Libroj, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Gerono, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajas-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaci, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smelū g-vė 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1. U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Anoncetoj.

RAVIGA TEATROLUDAJO EL FABELLANDO kun majskaraboj, fungoj, pigmeoj, papilioj. Ludebla tuj ĉie, ĉar SEN VORTO! Esperanta manuskripto kun muziknotoj sendata kontraŭ 6 svis. francoj. — J. Orzech, Inowrocław, Pol.

ARTAJ INSIGNOJ. „Agrable surprizita pri ilia ĉarma aspekto, s-o Poncet, vic-ĉefdel. de UEA en Lyon, varme rekomendas la artajn insignojn de f-ino Gérard, 9 rue d'Armaille, Paris 17.“

POŝTMarkoj de Polio, Danzig, Litovio kaj Latvio vendas malmultekoste s-o St. Kowalewski, Welniany Rynek 15, Bydgoszcz, Pollando. — Oni skribu poŝtkarton ilustritan!

NAPOLI (Italio). — Ĉiuj ĝeesperantistoj, kiuj vojaĝos aŭ travojaĝos tiun ĉi beleagan Italian urbon, bonvolu viziti la ĵus starigitan sidejon ĉe „Rinascita“, Via S. Lucia 34 (Hotel de Russie). Ili povas sin turni ankau al s-o F. Cesarini ĉe „Intendenza di Finanza“, Via Roma, Napoli.

SANĜO DE ADRESO. De la monato februaro mia nova adreso estas: Stefano Pedrazzini, ĉe Missas Pedrazzini and Company, Arispe (Sonora, Mexico). Deziras provnumerojn de Esp. gazetoj kaj katalogojn.

JAPANA POŝFORNO. Oni deziras aĉeti japanan poŝtfornon kaj karbo-pasteleojn por ĝia varmigado. Vendistoj, sendu prezaron al la adreso: M. Ribas de Pina, Comandante de Artilleria, Palma de Mallorca, Hispanujo.

PASTRO L. W. CRONKHUTE, post kvardekjara laboro, eks-ĝojs sian misian laborokampon ĉe Bassein, Burma, en frua aprilo, por reiri al sia usona hejmo. Nova adreso: Greenwich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li apete bonvenos leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantajn ĝeinfanojn. Responde li sendos leterojn kaj Burmajn kaj Hindujajn kartojn.

KOMERCO KUN HISPANIO. S-o Gaudencio Vazquez, str. Jaime Vera 26, Nerva (Huesca), Hispanio, deziras korespondi kun gravaj komercistoj, kiuj deziras eksporti komercaĵojn al Hispanio.

RAPIDIĜU ALIĜI al nova (4-a) eldono de „Bes-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj!“ Aliĝa kotizo: 1 sv. fk., 6 kĉ., 12 gmk. aŭ 5 resp.-kup. — Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

VIDLIBRETO DE ANTVERPENO. Sendu simplan internacian respond-poŝtkarton al s-o Frans Schoofs, del. UEA, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen (Belgujo), por tuj ricevi belan, ilustritan, 32-paĝan broŝuron pri la urbo Antwerpen, sidejo de nia VII-a Kongreso.

ANONIMA DONACANTO de 5 ekzempleroj de ET por aŭtoritatoj estas avizata, ke la sumo de 500 gmk. de li sendita elĉerpiĝos per n-o 75.

Tre utilaj libroj por ĉiulandaj Esperantistoj!

Jus aperis:

- Deligny.* Cours élémentaire d'Espéranto fr. fk. 0.60
- Aymonier.* Grammaire complète fr. fk. 3.—
- Palmer.* Méthode pour apprendre l'Espéranto fr. fk. 1.25

La ruĝa broŝuro (lernolibro de Esperanto, fr. fk. 0.25)

Ŝlosiloj de Ĉefĉ - francaj kaj danaj fr. fk. 0.10

Kapitano Baysl. Gvidlibretoj de la Ruĝa Kruco. Francaj, rusaj aŭ italaj fr. fk. 0.15

Diversaĵoj.

- A. Adams,* Esperanto inter la blindularo fr. fk. 0.25
- D-ro Good.* Higieno kaj moralo (studo dediĉata al la junularo) fr. fk. 0.75

Propagandiloj:

- Prof. Richet.* Conférence sur l'Espéranto faite à la Société pour l'Encouragement de l'Industrie Nationale le 13 Mars 1920 avec une notice sur le mouvement esperantiste fr. fk. 1.—

Ĉiuj mendoj estas antaŭpagataj. Bonvolu aldonu 10% por la poŝtelspezoj.

Sendu ĉion al la **Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris 9.**

Eksterlando Eksterlando.

Du kapablaj fakistoj je aĝo komence de 30 j., kun bonegaj praktikaj kaj teoriaj scioj, deziras tuj aŭ post kelka tempo gvidantan pozicion ĉe unuranga

Fabrikejo por fabrikado de kovertoj kaj por prilaborado de papero.

Konsiderindaj estas nur grandaj aŭ nove instalotaj fabrikejoj. Aliĝo de la formatoj, novaj muntadoj, aliĝoj kaj riparoj je ĉiuspecaj rotaciaj, rondkuraj, suĉaj maŝinoj por fabrikado de kovertoj kaj saketoj estas plenumataj je garantio. Ni estas ankoraŭ en firma pozicio. Plej bonaj referencoj laŭ deziro.

Afoblajn alskribojn bonvolu direkti al **E. Schwinkendorf, Hamburg (Germ.),** Gluckstr. 47.

Eksterlando Eksterlando.

La filatelista centralo

de la Esperantistoj liveras poŝtmarkojn ĉiulandajn kaj ĉiutempajn, pm. de Danzig, Memel, Saar (Sarre), Slesvig, Kärnten ktp., iamaj germanaj kolonioj tutekomplete 148 valoroj; ĉiuj filatelaj artikoloj (albumoj, lupeoj, preniletoj). Prezoj en germ. mk. Ilustrita prezaro 5 gmk. aŭ 1 resp.-kup. **Gefratoj Fischer, Nürnberg, Germ. Fünferpl. 6.**

En Rumanio

„Espéranto Triumfonta“ estas reprezentata per la Esperanto-Oficejo en Cluj (Koloszvar). Abonejojn, anoncojn kaj anoncetojn bonvolu efektiviĝi per ĝi.

LERNOLIBRO DE ESPERANTO POR LATVOJ kun Esp. laiva vortaro aperis (82 p., grandformata). Personoj dezirantaj posedi ĝin en sia kolekto da Esperantaĵoj, bonvolu sendi al la eldoninto s-o K. Strazde, Jelgava (Latvio), Zala iela n-o 15, kvar frankojn (francajn) aŭ laŭfundamente verkitajn Esp. librojn je sama valoro. Ne sendu bagatelojn!

LETERVESPERON, por havigi al la kursanoj korespondantojn, aranĝas Esp. klubo „La Stelo“, la 1-an de aprilo 1922. Sendu tuj leterojn kaj kartojn al f-ino Marta Sandberg, Asgatan 25, Eskilstuna, Svedujo, aŭ al s-o Erik Nilsson, Bergsgat 22, Eskilstuna, Svedujo. Ĉi nevre havos respondojn!

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

Filatelistoj atentu! S-o Meĥail Miĉev, del. UEA, (apoteke S. Menahemov), Varna, Bulgario, vendas pogrande kaj malgrade tre favore bulgarajn markojn. Postulu prezojn! Korespondas Esperante, germane kaj france.

S-o V. Prinada, str. Tonvizinskaja 10, Vladivostok, Siberio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o V. Tulubjev, Societo „Majak“, K. U. J. V., Vladivostok, Siberio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj.

Kelkaj svedaj knaboj, 12-14 jaraĵ, partoprenantaj Esp. kurson en supera lernejo, deziras korespondi kun eksterlandaj Esperantistoj por interŝanĝo de poŝtkartoj ilustritaj kaj poŝtmarkoj. Adreso: Esperanto-lernejo, Beskowska skolan, Engelbrektsgratan 9-11, Stockholm, Svedujo.

Mi serdas 100 aŭ 200 islandajn kaj div. aliajn bonajn danajn poŝtmarkojn kontraŭ sama kvanto da poŝtmarkoj de via lando. — Skolto Karl Sörensen, Storegade 14, Grenaa, Danlando.

Johannes Mammen, Grenaa, Danlando, membro de kristana knab-unuiĝo, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj aliajn aĵojn. (Filo de s-ino Magda M., del. UEA)

S-o Eug. Darden, Sint Joststraat 65, Antwerpen, Belglando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj por poŝtmarkoj.

Ĉaŭšani-Noi (Besarabio, Rumanio), f-inoj Ester Rabinoviĉ kaj Olea Ghitman, instruistinoj, deziras korespondi kun seriozaj Esperantistoj ĉiulandaj, serĉas gekorespondantojn por siaj lernantinoj (leteroj, poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustritaj).

Junulara grupo, havanta sian monatnan organon (bulgarlingvan) „Junulara penso“, deziras interŝanĝi kun ĉiuj junuloj, junularaj societoj ktp. Adreso: Grupo „Girdap“, str. Nova Cerkovna 20, Rusuko, Bulgarijo.

S-o Ivan Bogdanov, Ĉerepovec, Ruslando, Detskaja strato 107, deziras korespondi kun fremdlanduloj kaj interŝanĝas monajn signifojn.

Bulgaraj poŝtmarkoj. — Ni vendas ĉiujn specojn de bulgaraj poŝtmarkoj (50% rabato je Yvert & Tellier 1922). Unufoje monon per bankĉekoj. Oferto „extra.“ — Zjubomir Hasselkief, Pleven, Bulgario.



Se vi serĉas liveraĵojn por ĉiuspecaj komercaĵoj kaj industriaj aŭ se vi deziras akcepti la reprezentadon de eksportkapablaj firmoj, turnu vin en via propra intereso al la

KOMERCISTA ESPERANTO GRUPO
FREIBURG I. BR. (GERM.)
KATHARINENSTR. 14

kiu havas bonajn rilatojn al germanaj industriaj kaj komercaj rondoj. — Perado senkosta. — Al demando aldonu resp.-kup.

HISPANAJ SAMIDEANOJ!

Itala ĵurnalistoj, redaktoro de gravaj gazetoj „Resto del Carlino“ (Bologna) kaj „Giornale del Mattino“ (Verona), korespondanto por Italio ĉe ĉeĥa ĉef-ĵurnalo „Tribuna“, deziras verki regulajn korespondajojn pri itala vivo (politiko, arto, scienco, aktualajoj ktp.) por hispana faggazeto. Li povas verki Esperante aŭ senpere hispane. Sendu kaj sendigu proponojn al **D-ro Umberto Toschi, Colonia Veneta (Verona, Italio).** Afablaj perantoj ricevos du Esp. gvidlibretojn tra italaj urboj, kies aŭtoro li estas.

Interŝanĝo. Sendu al mi almenaŭ 100 uzitajn, nedifektajn poŝtmarkojn de via lando, kaj interŝanĝe mi sendos aŭ Esperantajn librojn aŭ bonajn poŝtmarkojn de Anglio kaj kolonioj. — Cecil C. Goldsmith, Withernsea, Yorks., Angl.

S-o Einar Nielsen, Brogade 4, Odense, Danujo (19-jara) deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Lars Hansen, Sect. Jørgensgade 30, Odense, Danujo (17-jara) deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj (bild-flanke) kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Samideanoj, dezirantaj havi belajn papermonojn, kiuj ekzistis ne pli ol unu jaron, demandu kondiĉojn ĉe Paul Belsnij, Estonio, Ambla, per afrankita respond-poŝtkarto.

Marko Campmany, str. San Francisco 67, Tarrasa, Barcelona, Hispanujo. — Mi sendos al ĉiuj landoj 50 malsamajn uzitajn poŝtmarkojn el Hispanlando al ĉiuj, kiuj volas sendi al mi saman kvanton da pm. de sia lando, ankaŭ malsamajn. Laŭ deziro mi sendos unue.

Paŭlo Felter, Montigny-lez-Metz, rue du Canada 2, Francujo, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

Rusaj sovjetaj poŝtmarkoj: jubilea eldono 1917-1921, 100, 250 kaj 1000 rubl.; ĵus aperinta eldono por helpe al malsatantoj (vidajoj de Volga), gr. formato 35 : 55 mm, 2250 rubl., tri samvaloraj specoj: ruĝa, verda kaj bruna. Liverado al seriozaj kolektoj. Paga por ĉeĥoj kaj naciaj bankbiletoj. — Georgo Gladky, Praha, Prihradka 454, Ĉeĥoslovakujo.

Fraŭlo Ivan Georgiev, str. Ohrid 43, Sofiĝo, Bulgario, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj leterojn kun samideanoj tutmonde.

Wiljo Saaristo, Wiipuri, Kaarlonkatu 2, Finnlando, interŝanĝas ilustr. poŝtmarkojn.

S-o J. O. Rauhala, komunuma sekretario, Wiipuri, Sorvali Kuudeskatu 17, Finnlando, deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj (precipe pri komunumaj kaj kooperativaj aferoj).

Se vi deziras profite interŝanĝi kun ĉiuj landoj interesajn leterojn, poŝtkartojn, poŝtkartojn ilustritaj, postmarkojn ktp., aliĝu al internacia klubo „Oriento“, skrzyńka poczt. 110, Wilno, Pollando. Jarko: 20 germ. mk. aŭ kĉ., 5 fr. fk., 3 sv. fk., 5 pes, 2 ŝil., 1 dol., ktp.

Ludoviko Fischer, Jaroslaw, Pollando, Slowackiego 9 (16-jara) deziras korespondi kun ĝejunuloj pri stenografio, bindado, elektrotekniko k. a.

S-o Kazimierz Kosinski, Lodz, Pol., Piotrkowska 118, interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Edmund Swiderski, Ruda Pabjanicka, Lodz, Polio, interŝanĝas papermonon kaj poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o Jose Ventura, 12, Roteros, Valencia, Hispanio, gvidanto de kurso Universitata, deziras ricevi po unu ĉiuspeca Esperantaĵo kaj korespondetojn por siaj ĝelernantoj. Li dankos poŝtkarte.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin sargas per la dissendo de cirkuleroj.

Prokuras komercajn adresojn.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando.

Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.

Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

Utilega Kuriozaĵo.

Ne estas supernatura povo, ĝi estas studaĵo pri la vivo, kiu montras kun ekzakteco, kiel vi povas atingi la triumfon de viaj talentoj, esti sukcesanta en viaj negocoj, societoj, distingvi viajn sincerajn amikojn de la malbonaj, ekkoni personon taŭgan por vi por feliĉa geedziĝo kaj fine esti kscia formanto de via propra sorto.

Sendu skribaĵon kun tago, monato kaj jaro de via naskiĝo, ĉu vi estas viro aŭ virino kaj tri ŝilingojn, tri francajn frankojn aŭ tri hispanajn pesetojn, per poŝtmandato, ĉeko, banknotoj aŭ iu ajn nacia mono samvalora en rekomendita letero adresata al fraŭlino

Laura de Jesus Buenos-Aires,
str. Calçada de Arroyos 71, Lisbono, Portugalio.

Oni korespondas Esperante, angle, france, hispane kaj portugale.

DRAPOJN

por sinjoroj kaj sinjorinoj vi malkare aĉetas je fabrikprezoj ĉe

Muthschall & K-io, Forst i. L.,
Germ. Gubenerstr. 28 Germ.

Kapablaj reprezentantoj serĉataj. — Vendo al privatuloj.

Korespondantoj, atentu!

Mi povas al vi liveri por via interŝanĝo tre malmultekostajn

belajn vizitkartojn kun via fotografajo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 40 gmk. ĉiu plia linio da teksto 2 mk. pli; sendkostoj 6 mk. 100 poŝtkartoj kun via portreto aŭ ia bildo (grupejo) 70 mk.; sendkostoj 9 mk.

50 glumarkoj kun via bildo 35 mk.; sendkostoj 4 mk. 100 glumarkoj kun via bildo 45 mk.; sendkostoj 4 mk. Postulu specimenojn! Skribu la preslekston klare, eble double. Via fotografajo estos resendata sendifekte. Livertempo necerta. Alsendo per rekomendita presajo.

... Vi demandas, ĉu mi estas kontenta, kaj mi respondas: Jes! trege! Via laboro estas bonega kaj belea. — Konrado Doménech, Gerono. — Mi povas diri, ke ili estas bonegaj kaj beleaj. — J. V. Holleman, Bergen, opzoom.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.

S-ino Eŭgenja Nowosielska, Lodz, Pol., ul. Andrzejka 7, deziras korespondi per leteroj pri ĉiuj temoj.

S-o Alfred Rätseppe, Tallinn, Estonio, Kuninge t. 1, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj, interŝanĝas poŝtmarkojn.

Erich Lantzech, Große Brüdergasse 16, IV., Dresden A. 1, Germ., deziras interŝanĝi poŝtmarkojn de ĉiuj landoj.

Franz Vavpotic, Brauk ĉe Horst, Uferstr. 11, Germ. deziras korespondi kun eksterlandanoj.

S-o Rudolf Grosser, Breiterweg 244/45, Zimmer 38, Magdeburg, Germanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.) kun la tuta mondo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, precipe kun orientanoj kaj eksterĉeĥojanoj. — Sendu 100 poŝtmarkojn de via lando, mi sendos 100 poŝtmarkojn de mia lando.

S-o Ladislao Micecy, ĉeĥflatenanto, Budapest, Hung., Grof Zichy Jenő u. 45, deziras korespondi per amikaj leteroj, ilustr. poŝtkartoj kun intelektuloj, ankaŭ kun blinduloj.

S-o Julio Kolofon, fervojo-oficisto, Timiŝoara IV, str. Grün-anker 8, Rumanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

S-o Geo Kvejtman, Lodz, Pjezd 14, Pol., deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per poŝtkartojn ilustr. kaj leteroj, interŝanĝas mobiliteojn, gazetojn k. a.

S-o Osw. Wittig, komercisto, Merseburg a. S., Germ., Klausentor 3, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandanoj, precipe fraŭlinoj.

S-o Stefano Sippy, Miskolc, Serhez u. 42, Hung., deziras korespondi per poŝtkartojn ilustr. kun tutmondaj gesamideanoj kaj serĉas laboron en eksterlando kiel preseja maŝinisto.

S-o Fritiof Ahnfeldt, instruisto, Torshors, Svedio, deziras korespondi per poŝtkartojn ilustritaj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Bv, fari la unuan sendaĵon!

S-o M. Dudas, Orsova (Rumanio), deziras interŝanĝi muziknotojn, fotografajojn (mem faritajn), ilustritajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

S-o Eŭgenio Molnar, komerc-akademiano, Cluj (Rumanio), str. Universitatii 10, korespondas per leteroj, poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kun Francio, Italio, Argentino.

Karl Herrmann, Germanio, Düsseldorf, Becherstr. 32, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj. Hermann Schmidt, Unteraltendorf 10, Merseburg, Germ., deziras korespondi precipe kun fraŭlinoj ĉiulandaj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), leteroj, interŝanĝas ankaŭ Esp. gazetojn.

Rudolf Bierlumpfel, Merseburg, Germ., Lauchstedterstr. 45, deziras korespondi precipe kun fraŭlinoj ĉiulandaj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj.

S-o Georg Neuber, Freiberg, Sa., Germanujo, Hornstr. 27, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondi per leteroj kaj poŝtkartojn ilustritaj.